4-a Jaro. N-o 172 APERAS  SEMAJNE 19. Januaro 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

KAPITALISMO KAJ SINDIKATISMO EN EGIPTIO

Egiptio estas agrara lando. Tri-kvaronoj de la enloĝantaro estas kampistoj. Malgraŭ ĝia memstareco, Egiptio, ne havante disvolviĝajn industriojn, estas ekonomie kaj politike superregata de la Brita Imperio.

Brita Imperialismo volas, ke Egiptio restu kiel malforta, agrara lando. Anglio per artaj metodoj aliformiĝis Egiption je lando kulturiganta nur unu specon de rikoltaĵo, t. e., kotonon, por provizi per ĝi la anglajn teksajn industriojn (Anglio estas la ĉefa konsumanto de egipta kotono). Rezulto de tiu ĉi politiko estas, ke depost la deviga kotonkulturigado, pligrandiĝas la enportado de aliaj diversaj rikoltaĵoj. Tiel, en la jaro 1897, Egiptio enportis fremdajn rikoltaĵojn je valoro de 1 793 940 da egiptaj funtoj sterlingaj. En la jaro 1925 ĝis 8 983 140. La granda malbono en ĉio ĉi montriĝas dum krizoj (ekz., malaltiĝo de kotonprezoj), ĉar 93% el la sumaj elportaĵoj de Egiptio estas kotono. Tial, la subita malaltiĝo de kotonprezoj lastjare, kaŭzis katastrofan krizon en Egiptio.

Granda problemo nun staras antaŭ egipta socio, nome, raciigo de landa ekonomio, kulturigo de serio da novaj rikoltaĵoj kaj la *industriigo de ĝia landa ekonomio.*

Egiptoj bone komprenas, ke nur per ekonomia raciigo kaj industriigo, la lando povos akiri la povon kaj forton por ricevi de la imperialista jugo ekonomian kaj politikan liberon[1]). Nuntempe naciista ĵurnalaro ofte parolas pri tio.

La kontraŭuloj al industriigo (t. e., grandaj kotonplantistoj, grandaj bienuloj, la anglo-egipta burĝaro kaj ĝiaj mem ideanoj ĉe la indiĝenaj komercistaj klasoj), kutime asertas, ke manko de brulaĵo malgraŭ abundeco de krudaĵoj malhelpas evoluon de indiĝena industrio. Sed, memorante la vastajn rimedojn de akvopovo, ni vidas, ke ĉi tiuj argumentoj estas senbazaj. Nature, la fundamenta fako de estonta egipta industrio estos la teksindustrio. Tamen, egiptaj ekonomiistoj montras serion da aliaj fakoj de industrio, kiujn oni estonte povos multe disvolvigi, kiel ekz.: ĥemia, papera, vitraĵa industrioj ktp.

Por kuraĝigi indiĝenan industrion, la egipta burĝaro starigis novan bankon ("Egipta Nacia Banko"), kies kapitalon monoferis sole enlandaj kapitalistoj. Ĉi tiu nova banko, diras Pariza ĵurnalo "Le Temps" (La Tempo), estas destinita por partopreni grandskale en novaj industriaj disvolviĝoj kaj en nova ekonomia vivo egipta.

Ankaŭ partoprenos grande la "Ligo por kuraĝigi egiptan industrion", kies prezidanto estas s-ro Viso-Vasif-Bey, estro de la naciista movado. Diversaj egiptaj industrio-fakoj havantaj sume kapitalon de 40 milionoj da egiptaj funtoj kaj dungantaj 200 000 laboristojn estas reprezentataj en ĉi-Ligo. La ligo prezentis memorandon al la Komerca kaj Industria Komisiono de la Financa Ministrejo por per emfazo malpliigi la doganaĵojn kaj impostojn, kiuj peras sur la novaj industrioj kaj ties produktaĵoj, kaj por sugesti serion da farotaĵoj: por ke la ŝtato donu kreditojn al la novaj industriaj entreprenoj, por ke ĝi partoprenu en la novaj industrioj, aĉetu plimulton da akcioj de fremdaj kompanioj ktp. La ĉefaj motoj de la Ligo estas:

1. Registara prefero de indiĝenaj industrioj.
2. Protektado de indiĝena industrio kontraŭ fremda konkuro.
3. Plibonigitaj komunikrimedoj kaj konformigo de fervojoj laŭ la nuna situacio.

Kie staras la laborista demando rilate al la nunaj ekonomiaj disvolviĝoj de Egiptio? Nature, la problemo pri laborpovo estas grava aktualaĵo. Memorante la ĝeneralan kreskon de loĝantaro (po 2 000 000 dum ĉiu dekjaro), kaj la intensan malriĉigon de la Terlaboristaro, kune kun la kreskanta alcentrigo de bienoj al la grandaj bienuloj, oni facile komprenas, pro kio Egiptio havas tian abundecan laborpovon. Jam de longe oni diras pri 2 000 000 da troaj laboristoj. Se industriigo malpliigos ĉi-nombron da senlaboruloj, ankoraŭ ĝi emas minaci pligrandan ekspluaton kaj ĝeneralan kapitalistan atakon kontraŭ la Laboristaro. Nature la burĝaro intencas konstrui nacian industrion per plimalbonigo de laboristaj kondiĉoj[1]).

Pro lastjara krizo laboristaj kondiĉoj jam plimalboniĝas. La burĝa ĵurnalaro freŝdate diskutis problemojn pri laborpovo kaj rilatoj al la laboristoj. Tial, la Laboristaro havas nun la taskon obteni la ordinarajn kondiĉojn, kaj batali por plibonaj. La vivcirkonstancoj postulas intensigon de la klasbatalo.

Je la malfermo de nova periodo de ekonomia disvolviĝo la egipta Laboristaro devas pripensi, ĉu ĝi sin oferdonos pro la burĝaro, ĉu ĝi batalos kontraŭ egiptaj kaj fremdaj kapitalistoj. Evidente, la laboristoj faros la duan, ĉar ili nun prezentas amasajn postulojn por pli-

[1]) En la moderna stadio de la produktado nacia ekonomia "libero" estas iluzio, neeblaĵo. La maniero, laŭ kiu la aŭtoro pritraktas la demandon, ŝajnas al ni erara. — *E. L.*

[1]) Por kio do utilos al la laboristoj la nacia liberiĝo? *E. L.*

altaj pagoj, plibonaj kondiĉoj kaj specifa laborleĝdono.

Tiu ĉi tendenco ofte montriĝas en la batalo por labora leĝdono. La revolucia Konfederacio de Laboro komencis antaŭe tiun ĉi movadon, sed la sekvinta reakcio ĉesigis la konfederaciajn agojn. En la jaro 1924 Labora parlamentano, Hasan-Nafi (estro de Kaira Federacio de Laboro) proponis rezolucion en parlamentejo por elekti "Komisionon por Laborproblemoj". Ĉar burĝaro kontraŭis, li malsukcesis. Tamen, en la jaro 1926 li reelektiĝis kaj reproponis la rezolucion kaj ĉi-okaze, pro granda bruego de la Laboristaro, parlamento akceptis lian rezolucion. Komisiono estis elektita, kies prezidanto estas Hasan-Nafi. La registaro elektis reakciulojn por malhelpi la komisionon. Ĝis nun ne aperis leĝprojekto.

La batalo, por ke la sindikatoj fariĝu laŭleĝaj ankoraŭ daŭras. Iuj sindikatoj tiucele jam alvokis al la registaro. La registaro ĉiam respondas, ke tion ili ne povas fari, ĉar ankoraŭ ne ekzistas Sindikata Leĝo. Kompreneble, tiaj kondiĉoj ĉiam malhelpis la laboron de sindikatoj. Malgraŭ tio, sindikatoj troviĝas ĉe la plimulto de egiptaj entreprenoj. Ili havas negrandan anaron. Mezgranda elcento da organizitaj laboristoj troviĝas inter la industrianoj, sed la terlaboristoj, estas tute ne organizitaj. Krom tio, manko de laborleĝaro malhelpas estiĝon de forta sindikata centro.

Vere, ekzistas Egipta Sindikata Federacio (en la jaro 1925 ĝi havis 100 sindikatetojn), sed ĝi estas tute neagema. La Federacio fondiĝis en la jaro 1924 post la subpremigo de la revolucia Konfederacio kaj sub la protekto de reĝo Fuad. Ĝia politiko estis ĉiam reformema. Je la amasoj ĝi havas neniom da populareco. Nuntempe ĝi malfortiĝas kaj malgrandiĝas. La plejgrandaj sindikatoj ne aliĝas al ĝi. Unu el la plejgrandaj sindikatoj estas la Sindikato de Registaraj Dungatoj, kiu havas filiojn en ĉiuj gravaj komercaj kaj industriaj urboj. Ĝia centrejo troviĝas en Kairo, kiel ĝi havas 7 400 membrojn. Suma anaro estas 13 000. Aliaj gravaj sindikatoj estas Tramistoj en Aleksandrio kaj Kairo, poste la sindikatoj de fervojistoj, tabakistoj, sukerfarejo-laboristoj, Suez-Kanalo-laboristoj, motorveturigistoj, ktp. Sume ekzistas en Egiptio ĉ. 120 sindikatoj, kiuj havas 50 ĝis 60 milojn da membroj. Malgraŭ malfacilaj kondiĉoj vigle kreskas nuntempe novaj sindikatoj. Ĉi tio verŝajne pruvas, ke la laboristoj klaskonsciiĝas . . .

Artikolo de *U. Zimring* en "Labour Monthly" (angla lab. gazeto) novembro 1927; tradukita de *S. H. Brooks* (SAT-ano 8500).

Ses jaroj de Internacia Laborista Helpo

La "ILH" estas organizo, kiu helpas dum mizero al amasoj da homoj en la tuta mondo. Ĝi konsistas el la ekzekutivoficejo de la "ILH", al kiu estas subalternataj landkomitatoj en 19 landoj, grup- kaj lokkomitatoj. La efikcirklo estas sindikataj kaj profesiaj organizoj, laboristoj kaj partioj, laboristunioj diversspecaj, artistoj, intelektaj bonstatiggrupoj, laborejoj kaj solaj personoj. Ĝia estiĝo estas jena:

El la sento de plej profunda interligeco kun la heroanima rusa popolo kaj ĝia Sovet-problemo estiĝis en jaro 1921 en ĉiuj proletaj klasoj de la mondo la deziro kaj volo, helpi al la laborist- kaj kamparan-ŝtato, en kiu furiozis terura naturkatastrofo. La longa kaj terura sekeco detruis la plej grandan parton de la rikolto. Multaj milionoj da homoj estis minacitaj de malsatmorto. En ĉiuj landoj laŭtiĝis voĉoj de proletara solidareco: Ni devas helpi al la fratoj kaj fratinoj en Sovetio. Direktata de Klara Zetkin, kuniĝis en Berlin internacia komitato, kiu alvokis por formi helpkomitatojn en ĉiuj landoj. La alvoko helpis. Ĉie formiĝis komitatoj, kiuj tuj aranĝis monkolekton. En Germanio oni kolektis pli ol du milionojn da germ. mk. (en mono kaj objektvaloroj), en la aliaj landoj pli ol 20 milionojn. Por la mono oni aĉetis manĝaĵojn kaj ekipobjektojn, kiuj estis transportitaj al Sovetio per 45 grandaj ŝipŝarĝaĵoj. La "ILH" partoprenis je la disdonigo per propraj veturiloj, ĝi pluen starigis produktejojn, modelajn ekonomiejojn, kaj ĝi alportis la unuajn plugmaŝinojn al Rusio. Per tia agado de proletara solidareco, la "ILH" helpis al la rusa popolo dum la granda mizero. La helpon meritis la popolo kun sia laborist- kaj kamparan-registaro.

La dua granda helpago de l' "ILH" ree estis iniciitita pro naturokazo. La grandega tertremo dum la somero en la jaro 1922 en Japanio. Centmiloj da laboristoj estis sen rifuĝejo, sen laboro, sen manĝaĵoj. La "ILH" ekfunkciis. La japana registaro malmulte faris por forigi la mizeron de la laborantaj amasoj, ĝi helpis al la posedantaj klasoj, sed perforte kontraŭis la laboristorganizojn. La "ILH" ree mobilizis ĉiujn siajn organizojn kaj helpis al la laboranta popolo. Ĝia helpo samtempe estis protesto kontraŭ la agado de la kapitalista japana registaro. Kontraŭ ĝi direktiĝis la proletara solidareco, — al la laborantoj ĝi estis dediĉita.

La tria helpago de "ILH" devis kontraŭstari al ankoraŭ pli akra mizero: al la malsatmizero en Germanio. Kaj tio signifis proletaran bataldefendon kontraŭ la kapitalista sistemo. Ĉi-malsatmizero ne estis sekvo de naturokazo, sed la efiko de socia stato, de la milito, de la inflacio kaj plue de kapitalistaj atakoj kontraŭ la Laboristaro. Al centmiloj minacis la malsatmizero. La entreprenoj eluzis la mizeron de la amasoj, por plimalbonigi la laborproporciojn, mallongigi la salajrojn kaj plilongigi la labortempon. La "ILH" ree mobiliziĝis en la tuta mondo. Kaj ne vane. Proletara solidareco helpis al germana Laboristaro. Milionoj fluis Germanion. La "ILH" en granda nombro da urboj starigis kuirejojn kaj manĝigis centmilojn. Plue ĝi forportis milojn da infanoj al eksterlando en bonan flegon. La "ILH" starigis infanhejmojn en Germanio, ĝi disdonis plue panon, konservojn kaj vestaĵojn. Ĝi ankaŭ subvenciis laboristojn, kiuj estis maldungitaj, aŭ kiuj batalis per strikoj kontraŭ la kapitalistoj por certigi sian ekziston. La "ILH" subvenciis la batalantan Proletaron, por ke tiu ne estu venkita de la kontraŭulo per malsato. Kaj tian agadon "ILH" daŭrigis en la sekvantaj jaroj ĉe multnombraj strikoj. Ankaŭ senlaboruloj estis subvenciataj, senpere aŭ per prizorgo de iliaj infanoj.

La poste sekvanta subvenciago de "ILH" estis kontraŭ la internacia kapitalo, kontraŭ la imperialismo. La ĉina popolo leviĝis en la jaro 1925 kontraŭ siaj imperialistaj subpremantoj. Per strikoj ĝi provis plibonigi siajn mizerajn vivkondiĉojn. La movado estis subvenciata de la ĉina inteligentularo, studantoj, profesoroj, anoj de liberaj profesioj. Ili ĉiuj simpatiis kun la laboristoj en la batalo kontraŭ la imperialismo. La sola organizo krom la rusaj sindikatoj estis "ILH", kiu rapidis helpi al la ĉina popolo. Estas vere, ke la ĉina popolo tiam estis venkita de la imperialismo, sed la movado ne estis sufokita. De Ĉinio disvastiĝis la revoluciaj ondoj al Hindio, Afriko, Hindonezio kaj al aliaj koloniaj regionoj. "ILH" ne bezonas laŭdi sin, ĝi estis farinta multon, por la revolucio kaj batalemo de la ĉina popolo.

La helppreteco de "ILH" denove estis pruvita dum la angla ministstriko en la jaro 1926. Preskaŭ samtempe kun la proklamo de la generalstriko, ankaŭ la alvoko de "ILH" iris en la tutan mondon, al ĉiuj proletoj kaj simpatiuloj por subvencii la anglajn ministojn en ilia batalo. 35 000 da anglaj funtoj kolektiĝis kaj estis senditaj al virinoj kaj infanoj de la angla minproletaro. Dum la tuta strikdaŭro "ILH" penis per simpatiemo kaj kolektado de mono en ĉiuj landoj helpi al la anglaj ministoj persisti en la batalo. Kaj tiu batalo direktiĝis kontraŭ la angla minkapitalo kaj ĝi direktiĝis en sia sekvo kontraŭ la Anglio kiel la plej granda imperia kaj kolonia potenco. El malfirmaj, hazardaj komitatoj, el okaza naturkatastrofo estiĝis tiu proletara helporganizo, kiu laŭplane kaj per ĉiuj fortoj subvenciis la batalantan Proletaron.

Tiel ankaŭ okazis en la jaro 1927. La grandaj movadoj en Germanio, Francio, Ĉeĥoslovakio, Ameriko, Belgio kaj Aŭs-

trio estis subvenciitaj per la solidareco de la laboristoj en ĉiuj landoj. La ekfunkciigo de "ILH" ĉe la katastrofoj en la saksa-ĉeĥa regiono kaj en Palestino atestas, ke "ILH" ekfunkcias ĉie, kie estas mizero de amasoj. En la potencaj bataloj, ĝi staros apud la klasorganizoj en la plej antaŭa vico . . .

El "Laborista Ilustrita Gazeto".
Elgermanigis: *9405*, membro de Lab. Esp.-grupo "Ni estu fratoj", Nowawes.



Faktoj kaj komentoj

Ĉu la laboristoj profitos je tio?

Dum longa tempo Hindio estis por Grand-Britio nur rezervujo, el kiu ĝi elprenis krudaĵojn, kaj disvendejo por siaj industriaj produktoj. Poste Hindio pli speciale fariĝis eksportejo por financa angla kapitalo. Hodiaŭ komenciĝas nova fazo: granda parto (60%) el la kapitalo investita en Hindio apartenas al la kreskiĝanta kaj ĉiutage plifortiĝanta hinda burĝaro. La amplekso de la hinda kapitalo atingis tioman gradon, ke siavice ĝi eĉ povas elmigri ĝis Sud-Afriko kaj tie konkurenci la anglan.

Se nuntempe la hinda burĝaro povas, sen la helpo de la brita, ekspluatadi la laboristojn el Hindio, estas memkompreneble, ke ĝi postulas la sendependecon de la lando. Kiu nacia burĝaro ja emas dividi la profitojn kaj honorojn kun alia fremda burĝaro. Sed ĉu la hindaj laboristoj profitos je tia nacia sendependeco?

Ili demandu pri tio al la proletoj el la "sendependiĝintaj": Polio, Ĉeĥoslovakio kaj aliaj "liberaj" landoj kapitalistaj . . .

EL POLIO

La juda klerikularo en Polio

Malmulte scias la tutmonda Laboristaro pri la judaj "diuloj" en Polio, kaj eĉ la malmultscio baziĝas je sciigoj el burĝaj gazetoj, kiuj rakontas kutime nur pri la "belaj" flankoj de la "diuloj", kaj vualigas ilian veran vizaĝaĉon.

Sed, se oni senvualigus ilin, tiam oni ekvidus ilian sufiĉe-malĝojigan vizaĝaĉon.

La plej gravaj el ili en Polio estas la rabenoj kaj "Agudo".

Ĝis la lasta tempo la rabenoj estis apartigitaj, sed komprenante la unuiĝforton, ili komenciĝas iom post iom unuiĝi. Por tia celo okazas ofte regionaj raben-kunveturoj en ĉiuj partoj de Polio. Tia raben-kunveturo okazis la 14-an de decembro 1927 en Krakovo, en la ejo de la juda "kahalo" (juda komunumo). Ĝia celo estis krei rabenunuiĝon de l' okcidenta Galicio. Ĉeestis 84 rabenoj kaj 500 delegitoj de la kahaloj el okcidenta Galicio. (Laŭ la juda gazeto "Hajnt" [Hodiaŭ], n-o 283). Kaj kiu ne memoras la pasintjaran raben-kunveturon de Kongres-Polio kun la sama celo? Difinitan politikan programon la rabenoj ne havis, sed tion al ili havigis la "Agudo".

"Agudo" estas juda religia, politika organizo de ortodoksuloj, kiu batalas por la *Ĥizuk hadaas* (Plifortigo de la religio). La "Agudo" proponis al la rabenaro aliĝi al ĝi. Multaj rabenoj konsentis kaj aliĝis (la plej gravaj): la Gera[1]), Radzina, Sokolova k. a.), sed estis ankaŭ kelkaj, kiuj malkonsentis kunmiksigi religion kun politiko kaj la proponon malakceptis (la plej gravaj: la Belza, Munkaĉa kaj la filoj de la Ruĵina).

Batalante por la religio, la juda klerikularo ("Agudo" kaj rabenoj) ne haltigas sin antaŭ plej aĉaj agoj. Faktoj abundas. Ni ekvidu laŭvice.

La unuaj paŝoj estas turnitaj kontraŭ la junularo, al kiu la rabenaro perforte malpermesas legi kaj studi "mondajn" librojn, sed rekomendas lernadi la sanktan Biblion kaj Talmudon. En la preĝejoj la rabenoj elpaŝas kun paroladoj kontraŭ la nekreduloj ktp.

Kaj ĉar ĉio-ĉi malmulte helpas, ili do per la nuraj vortoj ne kontentiĝas kaj alpaŝas al la "laboro": al bruligado de "sendiaj" libroj. Ankoraŭ freŝa estas en la memoro la bruligo de bibliotekoj en Korĉev kaj Radun kaj jen ni denove legas en la juda gazeto "Naje Folkscajtung" (Nova Popolgazeto), n-o 281: "En urbeto Bistric (apud Vilno) fondis la junularo judan popol-bibliotekon. Dum kelkaj jaroj oni kunkolektis ĝis 100 libroj el la nova literaturo. Tio malplaĉis al la tieaj fanatikaj judaj rabenoj, kaj ili forbrulis 40 librojn."

Kun la helpo de la polico — antaŭ kiu ili precipe en la provincoj denuncas junulojn, kiel "komunistojn", "antiŝtatulojn" k. s. — ili volas sufokigi la liberan

[1]) La Gera rabeno estas unu el la plej grandaj ne nur en Polio, sed ankaŭ en la tuta mondo. Li posedas tutan armeon de ĥasidoj, kaj estas riĉega.

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo dekdua)

La Patrio plilarĝiĝas

Necesas noti, ke la skizita organizformo laŭfamilia ekzistis dum epoko pri kiu la historiistoj ne povas liveri precizajn datojn. Oni tamen posedas sufiĉe da faktoj kaj argumentoj por povi kun verŝajneco aserti, ke nur tiaj malgrandaj homgrupiĝoj[22]) ekzistis dum kelkaj jarcentoj.

La tiutempa produktado, kiu konsistis preskaŭ nur el kamplaboro preparis la kondiĉojn por ekzistado de tiaj patrietoj. Kiam estiĝis elementa industrio, kiam interŝanĝado de produktoj fariĝis necesa kaj estis pli ofta, tiam kreiĝis kondiĉoj por plilarĝiĝo de la homaj grupiĝoj. Sed la reganta ideologio ne permesis kunfandiĝon de kelkaj gentoj. Necesis de ia kompromisa aranĝo inter la ekonomia neceseco kaj la religia ideologio, kiu forte influis la spiritojn kaj malhelpis racian evoluadon. La hejma religio ja malpermesis, ke du familioj kunfandiĝu[23]). Estis nur eble, ke ili kuniĝu konservante ĉiu sian propran kulton kaj sendependecon. El tio rezultis nova organizformo, kiun oni nomis *fratrio* ĉe la grekoj kaj *kurio* ĉe la italoj. Memkompreneble tiu plilarĝigita grupiĝo bezonis ian religian ligilon. Tial estiĝis supera diaĵo komuna al ĉiuj familioj kuniĝintaj en pli larĝa asocio. Ĉiu fratrio, ĉiu kurio havis sian kulton, sian altaron kun sankta fajro. La ceremoniaro similis tiun de la familio kaj konsistis ĉefe el komuna manĝo. Oni buĉis oferiton, kies karno estis kuirata sur la sankta fajro. Oni manĝis kaj eldiris kelkajn preĝojn al la dio, kiu kompreneble ricevis sian parton el la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

Ĉiu fratrio aŭ kurio okazigis kunvenojn, ĉe kiuj povis esti farataj gravaj decidoj kaj kiujn obei devis ĉiuj anoj de la asocio. Tiu plilarĝigita patrio do havis sian dion, sian kulton, sian registaron, sian estron tute same kiel la gento.

Nature tiu nova plilarĝiĝinta organizformo ne haltis ĉe tiu stadio. Kelkaj fratrioj aŭ kurioj sammaniere kuniĝis kaj formis tribon.

La tribo ankaŭ havis sian religion, sian komunan sanktejon kun altaro kaj protektanta dio. La dio de la tribo havis ordinare similan devenon kiel tiu de la fratrio aŭ tiu de la familio. Li estis iu diigita viro, iu *heroo*. Li donis sian nomon al la tribo, tial la grekoj nomis lin *nomdonanta heroo*. Ĉiujare okazis je lia honoro religia festo, kies ĉefa ceremonio konsistis ankaŭ el komuna manĝo, kiun partoprenis la tribo.

Ĉi lasta, kiel la fratrio kaj la kurio havis siajn kunvenojn kaj eldonis dekretojn, kiujn devis obei ĉiuj anoj de la tribo. Ĝi havis tribunalon kaj juĝrajton kontraŭ siaj membroj. Ĝi havis estron, nomitan *tribunus*.

Sed ni ne forgesu, ke tiu juĝrajto rilatis nur al la aferoj komunaj al ĉiuj membroj de la tribo. La gentestro daŭrigis havi plenan regecon rilate al la interna vivo de la gento. Li povis kondamni je morto sian edzinon, sian filon, sian sklavon aŭ sian klienton.

La Civito

Por kompreni la antikvan civilizacion — kaj eĉ la nuntempan — necesas neniam forgesi, ke la menso de la antikv-

[22]) Familio aŭ gento povis tamen enteni kelkajn milojn da homoj.

[23]) Ĉu ni ne povas nuntempe konstati la samon? Neniu nacio ja volus konsenti forlason de sia politika suvereneco en ia internacia organizo. Tio ĝuste estas la kaŭzo de la senpoveco de la Ligo de Nacioj por solvi la hodiaŭajn problemojn.

penson. Precipe la rabenaro kontraŭbatalas liberpensulojn. Ili eĉ postulas de la registaro, ke oni malakceptu sendiulojn en la judajn komunumojn (kahalojn). En "Hajnt", n-o 283, ni legas: "La rabenkunveturon de l' 14-a de decembro 1927 salutis en la nomo de la registaro d-ro Dziados, el la Krakova vojevodejo, kaj la Krakova urbestro d-ro Rolle. Post la salut-paroladoj, la kunsido decidis sendi salut-leterojn al pola prezidanto kaj al marŝalo Pilsudski. La rabenkunsido decidis postuli de la registaro ke ĝi malpermesu akcepton de liberpensuloj kiel membrojn en la Kahalon. Ankaŭ la pasintjara raben-kunveturo de Kongres-Polio decidis la samon.

Ofte la juda klerikularo kontraŭbatalas:

Profunuiĝojn, radikalajn novjudajn lernejojn, modon (precipe elkorsigon, mallongajn manikojn kaj jupojn — siatempe ili eĉ dungis specialajn "ŝmirulojn" por pudrigi la nudajn manojn de fraŭlinoj), teatron (En Berezno la rabeno kun kelkaj ortodoksuloj disŝiris la teatro-kurtenon, pro tio, ke oni aranĝis sabate prezentadon!), sporton kaj ĝenerale ĉiun ajn novigan elpaŝon.

Kaj ne nur en la provincoj, sed ankaŭ en la pli grandaj polaj urboj okazas samaj "porreligiaj" bataloj.

Ĉu la sabat-gardistoj[1]) en Varsovio ne disrompas montrfenestrojn de sabate malfermataj judaj butikoj[2])?

Ĉu ili ne batis en Varsovio judajn gazet-kolportistojn, kiuj sabate vendadas gazetojn.

Kaj ĉu la samo ne ripetiĝas en Vilno, Lublin kaj ĝenerale en preskaŭ ĉiuj urboj, kie nur ekzistas la "sabat-gardistoj"?

Ĉio-ĉi rememorigas la profundan mezepokon kaj ofte oni dubas: ĉu la dudeka jarcento ne transformiĝis en mezepokan jarcenton?

La "Agudo" havas siajn reprezentantojn en la parlamento (s-ro Kirŝbrojn[1]) k. a.), en urbaj konsilantaroj kaj en kahaloj (en Varsovio: rabeno Iĉe Mejer Levin[1]).

Iliaj deputitoj postulis antaŭnelonge en la sejmo (pola parlamento) enkonduki religion en ĉiujn popollernejojn, kie lernas judoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj aliaj reprezentantoj en la Varsovia kahalo kontraŭstaris la postulojn de la radikaluloj kaj socialistoj, nome: monsubteni la novjudajn popollernejojn, senlaborulojn ktp.

Kvankam la juda klerikularo, estas ankoraŭ sufiĉe forta en Polio, tamen la pli radikala kaj socialista junularo kune kun la liberpensuloj dispeligos iom post iom ilian influon malefikan sur la amasojn. *David Glizer (6600).*

[1]) Fakorganizo de la "Agudo".

[2]) Laŭ la juda religio oni devas sabate ripozi.

[1]) S-ro Kirŝbrojn kaj la rabeno Levin estas la ĉef-gvidantoj de la "Agudo" en Polio.

LA FAŜISTA TERORO DE HORTHY-HUNGARIO DAŬRAS

Dum la elektoj al parlamento en novembro 1926, Endre, la fifama distriktestro de la Pesta departamento arestis K-don Ladislaon Schönmann (Ŝenman), membron de Hungara Socialista Partio. La kialo? Pro "komunista konspiro". Neeble rakonti la turmentojn, kiujn travivis nia K-do, ĵetata de karcero en karceron, batata terure kiel en la tempo de plej kruelaj inkvizicioj. Mi aldonu, ke oni neniel povis pruvi la kulpecon de tiu K-do, kaj sekve li estas kontraŭleĝe tenata en malliberejoj. Ŝajne oni intencas lin vive entombigi.

K-do Johano Kutaŝ, terlaboristo, ekspolicano, ankaŭ membro de H. S. P., estis arestita, ĉar ne havante monon li piediris de Budapesto al Györ. La ĝendarmoj kaptis lin, kiel suspektindan personon. Oni punis lin pro "komundanĝera laborevito kaj vagado". Post la liberigo li ĉie denove estis "kontrolata" de la polico. Netolerebla fariĝis lia vivo. Kaj ĉio ĉi pro lia kuraĝa, senĉesa agitado inter la terlaboristoj. Oni internigis lin kaj li tie sidas denove depost 9 monatoj.

La 2-an de septembro 1927, okazis multnombraj arestoj. Inter aliaj estis arestataj K-doj Josefo Sollner kaj Arpado Ŝido. Ne povante forĝi kontraŭ ili gravan akuzon, por ke oni povu ilin transdoni al prokuroro, oni ilin ĵetis en la polican arestejon. La polictribunalo akuzis ilin pro "parolado dum nepermesita kunveno" je *9 monatoj*.

Tiuj kelkaj faktoj rezumitaj el tro longa raporto, spegulas sufiĉe bone la teroron, kiu regas en Hungario!

Laŭ raporto de *Elmigranto.*

---

uloj — ankaŭ tiu de la granda plimulto el la nuntempuloj — estis la rezulto de plej fantaziaj, mistikaj ideoj. Kaj por kompreni kiel povis okazi ŝanĝoj en la homa intelekto, estas necese ne malatenti la fakton, ke la kruda neceseco ekonomia devigis la homon konstrui domojn, fabriki diversajn objektojn aŭ ilojn.

Sur tiu kampo regas ia leĝo, kiu forigas ĉian mistikon. Sorĉaj procedoj ja ne efikas en la tekniko. Necesas apliki raciajn procedojn, obei naturajn leĝojn kaj ne fantazii. Kiu manipulas ilojn aŭ kondukas maŝinon, tiu ne atendas de ili miraklon. Metiisto, kiu sukcesas en sia laboro, ne dankas pro tio al dio; se li malsukcesas, li ne akuzas diablon, sed simple diras: "Mi estis mallerta." En okazo de malsukceso, inĝeniero same deklaras, ke li eraris en siaj kalkuloj, aŭ ke li maltrafis vidi ion gravan.

Tiel samtempe kaj paralele kun la mistika menso kreiĝis alia, kiun oni povus nomi *teknika menso,* kaj al kiu ni ŝuldas ĉiun progreson, ĉiun antaŭenpaŝon.

Sed ekster sia teknika laboro, la homo ofte refalas en fantazian mondon; li kreas al si diojn, kiujn li adoras, religiojn kaj kutimojn plej strangajn, al kiuj li sklave obeas. Okazas eĉ, ke li metas la teknikon je la servo de siaj mistikaj kredoj. Racio kaj mistikeco povas ja kunekzisti en la cerbo de individuo. Tial ni vidas hodiaŭ scienculojn kaj teknikistojn, kiuj estas ankaŭ mistikemuloj.

Tamen por ni ne estas dubo, ke la "teknika menso" pli kaj pli disvolviĝos malprofite al la mistika. Pli kaj pli la tekniko invados ĉiujn kampojn de la homa vivo, kaj sekve pli kaj pli la teknika, racia pensmaniero forigos la mistikan.

Se oni ne akceptas tiun vidpunkton, ŝajnas al ni neeble kompreni kaj klarigi la historian procezon.

Tiu mallonga temdekliniĝo helpos komprenigi la kunekziston ĉe la antikvuloj de du malsamspecaj religioj. Kaj ni konstatos, ke la religio, kiu rilatis al konkretaĵoj, al la naturaj elementoj fariĝis pli kaj pli potenca kaj finfine forpuŝis la religion el pure subjektivaj ideoj.

Ni jam vidis, ke la antikvulo pense vivis meze de siaj hejmaj dioj. Sed tio ne sufiĉis al li. Lia fantazio estis tre aktiva; ĝi kreis aliajn diaĵojn, kies karaktero estis malpli persona, pli ĝenerala kaj sekve pli kapabla utili kiel idea ligilo por pli larĝa grupiĝo. La homo diigis la elementojn de la naturo en kies manoj estis lia vivo. Li timis la fulmon kaj samtempe sopiris al la nubo, kiu alportas akvon por fruktodonigi lian rikolton. Li spertis senĉese ian miksaĵon el timo kaj respektego por tiuj potencaj fortoj: li ĝuis la lumon kaj timis la nokton; la suno, la luno, la riveroj, la maro ŝajnis al li vivantaj estaĵoj, kiuj povas fari ĉu bonon, ĉu malbonon. Tial li preĝis kaj adoris ilin kiel diojn. Kaj tiel naskiĝis Zeŭso, Ateneo, Junono kaj multege da aliaj malpli famaj dioj, kiuj loĝatigis la helenan Olimpon aŭ la roman Kapitolon.

(Pluo sekvos) *E. Lanty.*

La Esperanta Vortfarado
laŭ la Fundamento
de **Paul Fruictier**
Unika verko en nia lingvo, kiu detale pritraktas la derivadon kaj la signifon de l'afiksoj kaj de l'prepozicioj. La sola libro, kiu faciligos al vi la komprenon de la vortfarada meĥanismo.
Prezo: **1,80 mk. g.**
Havebla ĉe Administracio de SAT

TAGO EL MIA VIVO

Mi loĝas en komerca kvartalo. La brua mateno vekas min. Mi leviĝas kaj kuras al la proksima rivero. Post refreŝiĝa bano mi revenas hejmen. Mi matenmanĝas kaj iras poste oficejon. Mi estas 20-jara kaj laboras kiel kalkulisto en filio de la regnobanko.

Malgraŭ la malgranda salajro — mi ricevas 45 rublojn — mi estas kontenta el mia ofico, ĉar mi loĝas sola kaj miaj bezonoj estas malgrandaj. Je la 5-a horo posttagmeze mi finas mian laboron. Mi tagmanĝas kaj poste pripensas kien iri. Je la sesa okazos junular-kunveno de miaj samoficistoj. Je la sepa kunveno de la marksista rondo. De la oka ĝis la deka mi estos en la lernejo de librotenado. Poste promenadoj. Glitado sur la rivero. Je la dekdua plena de ĝojo kaj pensoj pri la pasinta tago mi kuŝiĝas. Mi legas ankoraŭ gazetojn kaj endormiĝas. Kun la gazeto en la mano mi vekiĝas matene...

Semiono Majzles (6917).

IMPRESOJ PRI SOVETIO

de okulvidinto, orelaŭdinto, fingrotuŝinto

(Daŭrigo)

EN MOSKVO

Antaŭvortoj

Estas fakto, kiun mi tuj volas substreki. Kiel dirite, estis en Moskvo delegitoj el 43 landoj formantaj ĉ. 30 lingvogrupoj. Kune ĉiam iris la anoj de la sama lingvogrupo kaj eĉ ne klopodis interrilatiĝi kun la K-doj aliĝantaj al alia grupo. Same okazis en hotelo: aparte dormis la germanoj, la angloj, la francoj, aparte ili manĝis. Interdelegita interfratiĝo, eĉ nur interamikiĝo evidentiĝis tute neebla pro la lingvodiverseco. Mi raportu memorajon: dum kelka tempo loĝis en la sama ĉambro kun Lerchner kaj mi ĉeĥoslovakiano, kiu — laŭ sia diro — inventis aparaton dank' al kiu ĉiuj povas interkompreniĝi. Sed tiun mirindan inventaĵon li neniam konsentis montri al ni. Ĝi tamen multe utilus por la kompatindaj diverslingvoparolantoj. Ni, esperantistoj, nian "aparaton" ĉiam propagandis, kaj multaj komprenis ĝian altvaloron. K-do Bässler jam sciigis en *Sennaciulo*, ke rezolucion favoran al esperanto subskribis dum Kongreso de Amikoj de Sovetio, kiun partoprenis ĉiuj delegitoj, 250 K-doj. Tio elmontras kiagrade, ne ni, sed la spertitaj malfacilaĵoj, instruis la delegitojn.

Aliparte internacia lingvo ne nur eblis al ni, ĉiulandaj SAT-anoj, starigi inter ni firman fundamenton de fakta interfratiĝo, sed ĝi ankaŭ donis al ni rimedon kiel eble plej serioze enketi pri ĉiuj flankoj de sovetia vivo. Mi kuraĝas diri, ke la delegitoj posedantaj nur sian denaskan lingvon vidis kaj aŭdis, kion la oficiala gvidantaro de l' delegitaro konsentis vidigi kaj aŭdigi al ili. Aliel ne povas esti. Kontraŭe ni pere de esperanto, sukcesis interrilati kun ĉiutendencaj K-doj, longe kaj aparte interparoli kun ili, tiel multon aŭdante kaj vidante, kion neniam atingos orelojn kaj okulojn delegitajn. Mi sekve rajtas opinii, ke niaj impresoj estas sendube tiuj, kiuj entenas kiel eble plej multe da vero, kiuj pleje alproksimiĝas al la reala sovetia situacio.

Ekonomia situacio kaj laboristaj vivkondiĉoj

Plurajn fabrikojn mi vizitis kun sufiĉe multnombraj laboristoj, pere de esperanto, mi sukcesis interparoli, mi eĉ trafis okazon longajn horojn aparte pasigi kun senlaboruloj, ĉu en Moskvo, ĉu en Ukrainio. Mi manĝis en laboristaj restoracioj, vizitis laboristajn loĝejojn. Unuvorte mi ĉiurimede klopodis kaj grandparte sukcesis partopreni la laboristan vivon. Nun mi devas publikigi miajn konkludojn: ĉu la laboristoj en Sovetio ĝuas pli bonajn vivkondiĉojn ol en Francio? estas demando, kiun mi mem ne kapablas respondi. Sed tiu sindeteno tuj evidentigas, ke unuavide ne ekzistas inter sovetiaj kaj franciaj laborularkondiĉoj taksebla diferenco. Ĝi ankaŭ komprenebligas, kial ni revoluciuloj vizitinte Sovetion povas tute sincere atesti: inter kapitalista lando kaj Sovetio ne estas ĉkulfrapa malsameco. Estas ja en Sovetio diverskategoriaj laboristoj, diverskoloraj panoj, diversklasvagonoj, diversrangruĝarmeanoj, senlaboruloj, almozpetuloj, senzorgaj infanoj, ktp. ktp....

Mi poste diros, kion oni devas opinii pri tiu aserto.

La salajroŝtuparo

Mi memorigu kelkajn ciferojn. Ne estas sekreto, la industrilaboristoj estas apartigitaj en kategorioj, kiuj simetrias kun la 17 ŝtupoj de la salajroŝtuparo. En fama kaj sendube modela fabriko — Dynamo, — kiun mi vizitis en Moskvo, la ŝtupoj estas jenaj:

Ŝtupo		perlaboras monate
1-a	metilernanto	21 rublojn[1])
2-a	"	30 "
3-a	nekvalifikitaj laboristoj	48 "
4-a	"	
5-a	"	
6-a	"	ĝis 58 "
7-a	kvalifikitaj laboristoj	. 60 "
8-a	"	
9-a	"	
10-a	"	ĝis 200 "
11-a	laboristoj	
12-a	inĝenieroj.	
17-a	direktoro . . .	ĝis 400[2]) "

Kompreneble, kiu prilaboras 48 rublojn ne vivas tiel bone, kiel la 10-a kategoriulo. Kaj estus dezirinde, ke ĉiuj laboristoj enpoŝigu 200 rublojn monate. Ni ĉiuj konsentas. Sed kiu serioze studis la problemon devas konfesi, ke trudi unikan salajron en sovetiaj laborejoj estas utopio. K-do Lozovski, sekretario de Internacia Ruĝa Sindikataro, deklaris al francia delegitaro, ke post Oktobra Revolucio estis enkondukita unika salajro. Konvinkiga estis la sperto: la kvalifikitaj laboristoj fuŝis la produktadon. Por ne pereigi ĝin, por ne neniigi la landan ekonomion, t. e. por savi Revolucion, estis necese denove returnenveni al la kapitalista salajrotarifo. Sed ĉu estas idealo? Ĉu tiu sistemo restos netuŝebla? Tute ne, respondis Lozovski. Ni intencas kiel eble plej baldaŭ reenkonduki egalan salajron, sed antaŭe estos necese: 1. la laboristan psikologion perfektigi, revoluciigi; 2. en niaj teknikejoj, laborlernejoj, profesiaj institutoj eduki tiom multe da kvalifikuloj, kiom bezonas nia ĉiujare rapidkreskanta industrio.

Kion respondi?...

G. Salan (Daŭrigota).

„Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas kaj eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno."

L. L. Zamenhof,

(Parolado ĉe la VIII-a Kongreso, Krakovo).

★

Germanio super ĉio, super ĉio en la mond'!

Multaj homoj en la mondo ne volas kredi, ke Germanio vere superas la aliajn naciojn. Dum longa tempo ankaŭ mi ne volis kredi tion, sed la faktoj pruvas evidente kaj nun mi konvinkiĝis. Jen la pruvoj:

Da ministroj, — do oficistoj kun alta salajro, — estas en Italio 8, en Belgio 9, en Usono 10, en Francio 13, en Britio 23 kaj en *Germanio* **80**, do pli multe ol en la aliaj landoj entute. Da membroj de ŝtataj parlamentoj estas en Belgio 340, en Usono 435, en Italio 530, en Francio 911, en Britio 1634 kaj en *Germanio* **2365.**

Kiu ankoraŭ riskas dubi pri la germania supereco en la mondo?

Burger (601).

---

[1]) 1 rublo = ½ dolaro, 2 mk. g., 12 fr. fr.

[2]) Multaj legantoj sendube jam scias, ke maksimuma monata salajro por kompartiano estas 225 rubloj. Povas do okazi — kaj fakte okazas — ke en sama fabriko sin trovas inĝenieroj je sama kapableco, la unuj senpartianoj, la alia kompartianoj. Tiuj perlaboras ekz. 300—400 rubloj, dum tiuj ĉi perlaboras nur 228 rubloj.

SENNACIULA STUDENTA PAĜO

SUB LA KONTROLO DE STUDENTA FAKO, ORGANIZITA ĈE JUNULARA SEKCIO DE SAT

Redakcia adreso: Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio), D. Snejko.

De Sekcio

Jam pasis longa tempo, kiam estis fondita nia Sekcio. Sed bedaŭrinde ĝis hodiaŭ ni havas en la vicoj de SAT multe da studentoj, kiuj ne aliĝis al Sekcio? Kial do?

Silentas K-doj el plej gravaj landoj. Francaj K-doj dume ankaŭ ne aliĝis. Kontraŭe: K-doj el blankaj landoj ĝoje akceptas informon pri starigo de nia Sekcio kaj aliĝas al Sekcio. Same sovetiaj studentoj silentas.

Dum la Oktobraj festoj en Moskvo okazis kunveno de studentoj alvenintaj Sovetion. Ili elektis komisionon por krei Internacian Studentan Union. Ni SAT-anoj devas kolekti niajn ĉiujn fortojn por — per nia ilo esperanto — helpi al ĉi komisiono kaj starigi ISU.

Ni havas la okazon pruvi la praktikan utilecon de nia lingvo kaj de nia laboro. Kaj ni devas ĝin pruvi. Aliĝu al Sekcio! Kunlaboru al SSP! Uzu artikolojn el ĝi por siaj studentaj naciaj ĵurnaloj.

D. S.

Medicina Edukado en Polio

Ĝis antaŭ tri jaroj ekzistis ĉe ni 3 diversaj sistemoj de medicininstruado: la aŭstria (Universitatoj en Leopolo kaj Krakovo), la germana (en Poznan) kaj la rusa (en Varsovio kaj Vilno). Nune ankaŭ ekzistas la cititaj 5 universitatoj. La studado daŭras 6 jarojn en la medicina fakultato. Ĉiujare oni estas ekzamenita (t. n. jara ekzameno). Nur post tiu-ĉi ekzameno oni povas iri al supera kurso. Ĝenerale la medstudado estas ĉe ni longdaŭra kaj malfacila, *ankaŭ multekosta.* La ekzamenobjektoj de l' unuaj du kursoj formas t. n. unuan rigorozon (fiziko, ĥemio, anatomio, histologio, fiziologio, biologio, fiziologia ĥemio, aldone multaj kolokvioj, la duan rigorozon formas (farmokologio, bakteriologio, patologio, anatomio patologia, jurmedicino, interna medicino kaj neŭrologio — t. e. 3½ kursoj); la trian — formas la restantaj klinikaj objektoj (ĥirurgio ktp.). Post tiuj 3 rigorozoj oni fariĝis antaŭe doktoro, nun nur magistro por doktoriĝi necesas skribi desertacion.

En ĉiuj polaj medicinaj fakultatoj ekzistas "numerus clausus", t. e. *oni akceptas studentojn procente laŭ religio.* Ĉe Leopola med.-fakultato oni akceptas pojare nur 130 gestudentojn, el tio ĉirkaŭ 20-grek-katolikojn (ukrainanojn) kaj 15 judojn.

Ni lernas el polaj kaj germanaj lernolibroj. En Leopola universitato studas ĉ. 4000 studentoj en bestkuracista akademio — 250 kaj en komercakademio ĉ. 200.

Z—er.

De la redakcio: Estas interese por SSP ricevi materialon por ekscii pri la studado en diversaj superaj lernejoj de l' tuta mondo. Plej gravaj estas punktoj: 1. Kiom longe daŭras la studado? 2. Ĉu estas enirekzameno? 3. Ĉu ĉiu estas akceptata (laŭ religio, nacieco ktp.). 4. Ĉu oni en ĉi lando poste povas praktiki. 5. Kiom da samaj superaj lernejoj ekzistas en via lando? 6. Kolega kaj societa vivo. 7. Interrilatoj, inter studentaro kaj profesoroj. 8. Vivkostoj (buĝeto de studento). 9. Subvencioj. 10. Enirvizoj. 11. Ĉu ekzistas iaj studentorganizoj ktp.

Studentaro en Bulgario

Post la faŝista "nokto" — la studenta movado iom ŝanĝiĝis. Faŝistoj perforte faŝistigis tiaman maldekstrulan asocion "Hristo Botev"[1]).

Sekvis jaroj de blanka teroro dum kiu ne malmultaj studentoj kaj studentinoj estis mortigitaj kaj ĉio ŝajnekdormis.

En la jaro *1926* la studentaro ekmoviĝis. Estis fonditaj akademiaj societoj (en ĉiu fako) kaj eĉ tiuj societoj nun intencas unuiĝi kaj fondi union de bulgarpopola studentaro. Kontraŭ ili staras "Hristo Botev"-asocio kiu ankaŭ deziris fondi studentan union, sed malsukcese. Kia mokigo de la nomo de plej granda Bulgaro — revoluciulo! Kontraŭ kiuj li batalis kaj en batalo kun kiuj li pereis — tiuj nun flirtas kun lia nomo. Nunjare eĉ la festado de 51-a datreveno post lia pereo estis malpermesita por studentoj.

Meze de "Hristo Botev"-asocio kaj akademiaj societoj estas la etburĝaj flavaj "neŭtralaj" studentaj societoj. Ili estas kontraŭ faŝistoj (de jure), sed kunvenas kune (de facto).

Nun aperas du gazetoj "Studenta Voĉo" (dekstrula) kaj "Studenta tribuno" (maldekstrula). Dum la teroro en la jaroj 1923/25 multaj komstudentoj forkuris al Germanio, Francio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio ktp. Ili fondis union "Narstud" (Popola Studentaro) kun samnoma presorgano.

Dum la lastaj monatoj la blanka teroro kvazaŭ plikrueliĝis. Denove kelkaj K-doj estis mortpafitaj. Pri aliaj ... oni presis en la gazeto, ke ili ... "foraperis". Kien? ... Ĉiutage gazetoj raportas pri "forapero" da kelkaj K-doj. Faŝistoj denove eklaboris.

R u s e (Bulgario). *G. R.*

TRA STUDENTIO

Dum la lasta vintra semestro en germanaj universitatoj studos 7625 eksterlandanoj, el ili: — 711 bulgaroj, 645 rumanoj, 495 poloj, 332 hungaroj, 286 rusoj, 285 svisoj, 270 jugoslavoj, 216 danziganoj, 162 estonoj, 101 transkaŭkazianoj k. a.

[1]) Nomo de konata bulgara revoluciulo.

Dum la Oktobraj festoj en Moskvo okazis Internacia konferenco de studentaro. Partoprenis K-doj alvenintaj el diversaj landoj.

Konferenco esprimis la deziron pri fondo de Internacia Studenta Unio.

Nur hodiaŭ ni eksciis pri la morto de nia juna, agema, SAT-ano studento

A. SKUGAREVSKIJ

Tia 21-jara junulo multon faris por nia SAT-movado. Kordisŝiro — interrompis lian vivon kaj agadon. Li laboris en Gomel kaj Kazan.

Honoron al lia memoro!

Al lia familio nia Studentsekcio sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

SAT-Student-Sekcio

D. S n e ĵ k o.

Kulturaj novaĵoj

Bulteno de Tut-Unia Societo por Kulturaj Interrilatoj kun eksterlando (VOKS), kiu aperas en Moskvo havas esperantan resumon kaj fakon "Esperanta kroniko".

En dika literatur-scienca ĵurnalo "*Uzrussa*" (Supereco), Minsk, Blankrusio, aperis granda artikolo de F. Perĥo kaj D. Sneĵko pri "Finna literaturo". Ĉi artikolo estis verkita en esp-o de du K-doj, kiuj loĝas en aliaj landoj.

En n-o 3 aperis artikolo pri "Japana literaturo". Materialo estis kolektita dank' al esp-o!

Sendu artikolojn pri literaturo de via lando en Minsk por aperigi ilin en ĵurnaloj.

"Väst-Svenska Kuriren" aperigis Oktobran numeron de sia gazeto. Multe da materialo kaj foto estis ricevitaj per Esperanta-SAT-Servo.

En la n-o 3 de "Ruĝa Studentaro" (Moskvo) estis presita rakonto de Dim. Belyj "Boen Smotr", pri la vivo de Bulgara Studentaro kaj letero de Bubo el Jugoslavio kun noteto de redakcio. Ĉie estas menciita esperanta deveno de materialo.

En Oktobra festa numero aperis 6 per SAT-studentsekcio ricevitaj salutleteroj de Studentaro de Svedio kaj saluto de nia studenta SAT-sekcio.

Ni bezonegas materialon pri Indonesia Studentaro. Ĉu iu holanda studento povas liveri al ni tradukojn pri ĉi demando el artikoloj, presitaj en "De Tribune".

TRA ESPERANTIO

VERO ANTAŬ ĈIO

Ni ricevis jenan leteron:

Rostov-Don, decembro 1927.

Estimata Redakcio,

Antaŭ kelkaj monatoj germana SAT-ano skribis, ke sovetiaj K-doj verkas artikolojn por "S-ulo" kvazaŭ laŭ propono de soveta registaro. Laŭ mia opinio K-do estis prava. Li estis prava pro tio, ke en "S-ulo" abundas prisovetia materialo pri plensukcesoj de laborista, ekonomia, kultura vivo, sed *tute mankas* artikoloj skizantaj malsukceson, pri ankoraŭ ekzistantaj malordoj.

Ni, sovetianoj, certe alkutimiĝis legi nur artikolojn traktantajn pri malbona, sufera vivo en aliaj landoj, sed ial prisilentas niajn mankojn videblajn. Simile al sovetiaj ĵurnaloj, en kiuj ĉiam estas vipataj misuzoj ekonomiaj, "sovetaj burĝoj" ktp., mi proponas, ke sovetiaj K-doj ne prisilentu la temojn pri senlaboruloj, senhejmuloj (kies multeco en grandaj urboj frapas la okulojn), loĝeja krizo en urboj, pri malklereco de kamparanoj, sed verku artikolojn pri ĉi-tiuj mizeroj, ankoraŭ regantaj en nia lando kaj nur tiam ni prezentos al alilandaj K-doj plenan bildon de l' vivo en Sovetio. Mi kredas, ke vero devas esti antaŭ ĉio. *5458*

ESTU INDULGEMAJ!

"Nek en koro nek en kapo restas io", sub tia titolo skribas K-do *Piskunov* artikolon en "S-ulo" n-o 167, el kiu ni kun bedaŭro ekscias, ke kvankam en la germana delegacio estis kelkaj SAT-anoj, ili tute ne anoncis sin, tute ne serĉis esp-ajn K-dojn. Tio vere estas malinda. Estas bone, ke sovetaj K-doj tion komunikas. Eĉ dankinde, ĉar oni povos tiun aferon priparoli publike. Sed ni profunde serĉu la kialojn.

K-do P. finas sian artikolon per vortoj: "Ĉu pro senbaza timo?.. maldiligenteco?.. nepripensiteco?.. aŭ pro kio?" Eble estas ĝuste kelkaj motivoj (krom maldiligenteco, mi kredas), kiuj hezitigis germanajn K-dojn sin anonci.

Estas ekz. facile lerni nian lingvon, sed ne estas facile ĝin paroli sufiĉe flue kaj paroli publike estas speciala arto, por kiu oni bezonas ankoraŭ iom da kuraĝo!

Se okazis al iu, ke dum lia paroladeto kelkaj ridetas pro lia malfacila parolado, tiam li ne plu kuraĝos paroli kaj evitos tion kiel eble plej multe. Ni estu do indulgemaj al K-doj, kiuj ne bone parolas, kiuj havas malfacilaĵojn kaj devas longe primediti antaŭ ol diri ian frazon. Oni ne moku K-don, se li eĉ serĉas vortojn en la vortaro dum sia paroladeto. Tiam li ne plu hontos kaj tiom pli rapide ellernos la lingvon. For la honton! "Kuraĝe", senĝene uzu vian poŝvortaron dum interparoladoj, ĝis kiam vi tute perfektiĝos! *8070.*

Studento-Servo

Redakcio de SSP petas studentojn kaj kulturlaborantojn el ĉiuj landoj sendadi al ĝi materialon, kronikon, notetojn pri la kultura vivo en via lando (literatura, muzika, arta ktp.). Ĉi materialo necesas por liveri ĝin al kulturgazetoj, ĵurnaloj kaj organizoj. Fotoj ankaŭ estas akcepteblaj. Sendu ĉion al Redakcia adreso de SSP.

D. Snejko serĉas K-don kiu povus helpi al li (ĉu per sendo de materialo ĉu per leterinterŝanĝo) verki artikolon pri "Lasttempa ĉina literaturo".

NIA POŜTO

Salan (Francio). Ni atendas vian aliĝon al Sekcio kaj artikolojn por nia paĝo pri viaj impresoj de Sovetia studenta vivo. Ni bedaŭras, ke vi ne havis okazon viziti nian redaktejon.

Toulousaj SAT-anoj. Ni atendas vian respondon al nia longa letero!



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Dancu, Marionetoj! Novelaro de Julio Baghy. Eldono de la aŭtoro, Budapest VII, Rottenbiller-utca 66 I. em. Formato: 16¼×12½ cm., 173 pĝ. Prezo: Duontole bindita, 2.60 mk. g.; tole bindita sur luksa papero 3.70 mk. g.; bibliofila silke bindita, 9 mk. g.; bibliofila lede bindita 11 mk. g.

Ni ĝoju pri nova tre leginda libro. Ĝi entenas 10 verketojn — novelojn, alegoriojn, rememoron pri infanaj tagoj kaj spritan rakonton pri esperanta lingvo.

Oni atendus de tia famulo, kiel Julio Baghy, perfektecon, sed bedaŭrinde tion oni ne renkontas ĉi-tie. La verkaro entenas unue multe da neologismoj, ekz. tempesto, volont*oro*, stumbli, skabeleto, pravoslavo, gentlemano, pietato (tiu pia etato psalmas!), gapis ktp.; due, tro da preseraroj por ke la promesitaj foto kaj letero de l'aŭtoro kompensu ilin, almenaŭ por la "filoj de biblio", kiuj pagos 11 mk. g.; trie, ne mankas strangaj frazoj, kiel: "Ili mordadas la kolon de unu al alia", "La kusenon vi kovris sur lian vestaĵon", "kvankam . . . *sed*", "Tion de darfas montri", "... li venos, se mi alparol*is* lin" ktp.

SAT-anoj rimarkos aprobe kontraŭmilitkaj religian tendencon ĉe l' aŭtoro; sed eble la virinojn ne kontentigos la malnova ideologio rilate ilian socian pozicion: oni legas, ke prostituistinon "evitas ĉiu bonstata homo" (kaj la klientoj, s-ro Baghy?). Ni sciiĝas, ke la virino estas malforta por venki la viron kaj "dolĉigi la amaran postguston de la triumfoj vanaj".

Resume, spite kelkaj malbonaĵoj, la verko estas tamen rekomendinda. *E. K. L.*

D-ro Walter Lippmann, La refleksiva pronomo en Esperanto. 20 pĝ. 11×13½ cm., Prezo: 0.40 mk. g. Eldonejo: Heroldo de Esperanto, Horrem b. Köln (Germ.).

Tre rekomendinda broŝureto, kiun devus ĉiu studi, kiu verkas en esp-o kaj ĉiu, kiu deziras ĝuste uzi la refleksivan pronomon.

Edvardo Wiesenfeld, Galerio de Zamenhofoj. 40 pĝ. 11½×16½ cm., Prezo: kart. 1.— mk. g. La sama eldonejo..

El tiu ĉi libreto ni ekscias kun bedaŭro, kiom multaj Z-ofoj havas nenion komunan kun la — ideoj de sia familiano Lazaro Ludoviko, aŭtoro de esperanto.

M. C. Kus, Ribelemaj virinoj, trad. el ĥina lingvo *Ŝ. M. Chun.* 32 pĝ. 13×20 cm. Prezo: 0.50 mk. g. La sama eldonejo.

Tiun modernan ĥinan dramon en du aktoj ni povas rekomendi laŭ la lingva vidpunkto. Nur tre malofte ni renkontas "malglataĵojn". *Interim.*

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

Aŭstrio. Spite malbonaj ekonomiaj kondiĉoj nia movado vigliĝas en *Linz.* Komenciĝis nova kurso gvidata de K-do Franz. La 14. 12. 27 ni festis la naskiĝotagon de Z-f. Okazis interesa parolado de K-do Franz, nuna klubestro, pri vivo de Z-f kaj pri valoro de esp-o por la Laboristaro.—**Sovetio.** Ĉi-jare rimarkinda plivigliĝis la esp-a movado en *Ĥarkov.* La radiostacioj tre favoras kaj disaŭdigas paroladojn ktp. en esp-o. Ĵurnaloj aperigas favorajn artikolojn. Vigla movado inter la junularo. Du junpioniraj ĉeloj studas la lingvon. Grandaj sukcesoj en sindikataj rondoj. — En *Krasnodar* funkcias 9 rondetoj esp-aj kun pli ol 130 personoj. — En *Perova* (9 km. de Moskvo) laborista klubo de fervojistoj ekfunkciigis esp-an kurson kun 30 personoj. Kursgvidanto pagata. La 18. de decembro parolis ĉe ni K-do Sons, ano de Angla Laborista Delegacio, dum vesperfesto, kiu bonege sukcesis. —

MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

L'Effort, Lyon, 1. 12. 27: Ĥaoso en Britia Karbindustrio (163); El Estoniaj malliberejoj (Nia Vivo) (163); La "biblia" Britio (163). 15. 12. 27: Alia Sacco, alia Vanzetti (164); Inventisto sen Honoro! (156); Konsilejoj por Edzeco (164); Pli bone aŭ malplibone? (166); El Aŭstrio, la eksiĝoj (164). — *Le Matérialiste*, Bruxelles, novembro 27: Homo kaj Dieco (156).

INVITO

Anarkista **Junulara** *Internacio* invitas ĉiujn anarkistajn k. sindikatistajn junulojn el la tuta mondo partopreni la kongreson, kiu okazos la 29. k. 30. majo 1928 en *Huizen* apud Amsterdamo. Por ricevi detalajn informojn oni skribu al K-do *M. Stevens*, Shackletonstr. 16, I, *Amsterdam*, Holando.

NEKROLOGOJ

Post longa tuberkulozsuferado mortis la 3. 12. 1927 nia kara K-do

JOAO AUGUSTO DA CRUZ

SAT-ano 1373 dum 1922—1924 kaj frato de nia SAT-K-do Leonel A. da Cruz.

Honoro al lia memoro!

La Lisbonaj SAT-anoj:

Leonel da Cruz (1374), *Joas do Carmo* (8021), *Antonio Ramalho* (8147), *A. P. da Costa Junior* (1635).

La 20-an de decembro 1927 mortis en Astraĥan pro tuberkulozo nia K-do

K. V. Dzetovecký

SAT-ano n-o 5696. Li estis nur 23-jara. Kunsenton al la Familio!

NIA POŜTO

1305. — La konkludo de via artikolo estas, ke vi deziras korespondi pri stenografio. Nu, ekzistas koresponda fako en "S-ulo". Ĉiokaze ni tamen povas informi vin pri ekzisto de *Fluganta skribilo,* stenografa ĉiumonata Gazeto, 9. Bd. Voltaire *Issy-les-Moulineaux,* Seine Francio.

5820. — Tiajn anoncojn ni ne povas publikigi senpage.

4358. — Bonvolu afranki ĝuste viajn leterojn: ni devis pagi 1.60 fr. fr. kiel punon.

10 329. — Poeziaĵo postulas perfektecon por esti publikiginda. — "S-ulo" ne povas esti *agita organo;* vi do erare volas uzi ĝin por fari grandan skandalon". Vi plie forgesas, ke ĝi estas nur ok-paĝa. — Al ni ankaŭ ne plaĉas ĉiuj artikoloj aperintaj en la gazeto; sed ni agas lojale rilate al ĉiuj tendencoj, ekzistantaj en la lab. movado. La K-doj, kiuj deziras sincere sin eduki devas esti kapablaj legi artikolojn, kies enhavon ili ne aprobas. Nia gazeto ebligas *komparadon de ideoj* k. tiel plenumas sian *edukan* rolon. — Pri la cetero vi baldaŭ legos respondon en aperigota komuniko de la Direkcio. *E. L.*

7459. — Via anonco ne povas aperi, ĉar tiu kondiĉo jam delonge ne plu validas. *Adm.*

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *Johann Jahoda,* Laxenburgerstr. 40, p. 6, *Wien, X,* dez. koresp. kun sovetiaj K-doj k. laboristoj de tieaj elektraj centrejoj pri laboro, salajro, vivo, deĵoro, libertempo ktp., petas fakan propagandmaterialon.

Belgio.

— Lab. Esp. Grupo el Verviers dez. koresp. kĉl. por gelernantoj k. grupanoj. Resp. garantiata. Adr.: K-do *Pierre Grignard,* 158 Rue de Mangombreux, *Verviers.*

Ĉeĥoslovakio.

K-do *Etwin Prediger* (vegetarano, 30 j., ĝardenisto), *Antoniwald ap. Gablonz a. N.,* dez. koresp. kun K-dino el varma regiono pri klimao, terkulturo k. a. temoj.

K-do *Etwin Nitsche, Antoniwald ap. Gablonz a. N.,* dez. interŝ. PK, PI, kĉl. pri div. temoj.

Francio.

K-do *Cachon,* tipografisto, 6 rue Pierre Curie, *Paris, V,* dez. interŝ. kun presej- k. paperlaboristoj el ĉl. sciigojn pri laborkondiĉoj, organizado ktp. publikindaj en sindikatorganoj.

K-do *Louis Gros, 22,* rue Creuzet, *Lyon,* dez. interŝ. PK, PI, kĉl. Resp. garantiata.

Germanio.

K-do *H. Zumpe,* Neustädter Strasse 9, *Bischofswerda i. S.,* dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Certe resp.

K-do *Gustav Pohlmann,* Herforder Str 16, *Bielefeld-Schildesche,* dez. koresp. kun K-doj el Hispanio k. Francio pri diverslokaj cirkonstancoj, L, PK.

K-do *Helmut Missbach* (magistrat-oficisto), Nordstr. 178-B, *Grossröhrsdorf i. S.,* dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. L, PK. PI, PM. Resp. garantiata.

K-do *W. Krey,* Mariannenstr. 77, II, *Leipzig O 28,* dez. koresp. nur kun nordeŭropaj landoj, L, PI.

K-do *Fritz Goltermann,* Ratherbroick, 55, I, *Düsseldorf-Rath,* dez. serioze koresp. kĉl. Konsideru, ke mi estas lernanto k. junulo.

K-do *Otto Burghardt* (fraŭlo, 20 j.), Oybinerstr. 18, *Zittau i. S.,* dez. koresp. pri div. temoj L, PI kĉl. Resp. garantiata.

K-do *Hans Vonend,* Stollberger Str. 47, *Neukirchen i. Erzgeb.,* dez. interŝ. PI, bfl. Resp. garantiata.

Norvegio.

— Mi dez. korespondantojn por miaj lernantoj — speciale tramistoj. Adr.: K-do *A. Stensrud,* Torshovgt. 4, *Oslo.*

Rumanio.

K-do *Ludoviko Staub,* Str. D-ro Velicin. 1-a, *Arad,* dez. interŝ. L, PM, kĉl.

K-do *Johano Mejer,* Str. Teodor Serb, 23, *Arad,* dez. interŝ. L, PI, kĉl..

K-do *Karpati Adalberto,* Bd. Reg. Maria, 9, *Arad,* dez. koresp. pri politiko, proletkulto, interŝ. PM, kĉl.

Sovetio.

K-do *V. Kruglov,* Orlovski per. 1, *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. kĉl.

K-do *V. Vaklanov,* Volodarska, 69, *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. kĉl.

K-do *P. Oficerkin,* Volodarska, 96, *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. kĉl.

K-dino *A. Miĉurina,* ul. Kalaeva, 12, *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. kĉl.

— *Esperanto-Rondeto* ĉe Laborista Klubo, *Naro-Fominsk,* Mosk. gub., dez. koresp. kun esp. grupoj el ĉl. pri ĉ. temoj.

K-do *Ju. Gromov,* Leninskaja, 92, kv. 1, *Blagoveŝĉensk* (Ekstrem-Oriento), dez. koresp. kun Hispanio, Holando, Svisio k. Norvegio, precipe pri etno-geografiaj demandoj, L, PI, resp. garantiata.

K-do *V. Ŝlagovski,* Zandjelovskij per. 2, kv. 17, *Odessa,* dez. koresp. kĉl.

— La Junular-Rondeto serĉas koresp.-antojn el ĉl. pri problemoj de Junularmovado ktp. Adr.: *S. Holesniĉenko,* Sovetskaja, 19, *Brjansk.*

— 15 Gek-doj dez. koresp. kĉl. L, PI. Resp. garantiata. Adr.: *Klub Ĵeldor, St. Krasnodar, I.*

— Junpionira kolektivo invitas K-dojn al koresp-ado: L, PK, PI, kĉl. Adr.: *Ĥarkov,* Neteĉenskaja ul. 37, 5-ja Tabaĉnaja Fabrika, al K-do Davidov, Kollektivu Pionerov.

K-do *Natano Ĵitomirski,* Pritisko-Nikolska, 9, 3, *Kiev,* dez. koresp. interŝ. il. gaz. ĵurn. kĉl.

— Ŝakgrupo de laborista klubo de riverŝipanoj dez. ŝakludi k. koresp. kun lab. ŝakgrupoj el ĉl. Adr.: *Kiev-Petrovka,* Konstantinovska, 5, Klub Vodnikov (K-do Kovalenko).

— Junkomunistoj tutmondaj! Junkomunista ĉelo (400 pers.) ĉe Instituto de Popola Klerigo dez. koresp. kolektive k. individue. Skribu multnombre! Adr.: *S. Kudrjavickij,* poŝtkesto, 171, "Por Labesko", *Dnepropetrovsk.*

— 50 gejunkomunistoj dez. koresp. kun samaj pri ĉ. temoj k. lab. maniero de junkomunistaj ĉeloj kĉl. Adr.: *Kremenĉug,* Sovet-str. 41, 3, al A. Semjonov por junkomunistoj de OKRFO.

K-do *S. Lejboviĉ,* Mizikeviĉa, 46/1, *Odessa,* dez. koresp. kĉl.

Svedio.

— Esperanto-Klubo, Box 23, *Skoghall,* dez. koresp. kĉl.

Monata Esperanta Gazeto

Esperanto en Nipponlando

Bone redaktata kaj bone ilustrita gazeto en Japanio.

Jarabono: 15 sm., 3.75 sv. fr. aŭ 15 resp -kuponoj.

Petu provnumeron (por unu resp.-kup.)!

Eldonejo:

KOKUSAIGO-KENKJŬ-ŜA

Motozono-ĉo, Kôĵimaĉi

Tokio (Nippon)

Kun granda ĝojo ni sciigas al niaj amikoj, ke la plej juna liberpensulino kaj esperantistino **Bona Vera Floss** naskiĝis la 28. 12. 1927.

Kurt Floss kaj edzino (SAT 3332).

ATENTU!

K-do **Hermann Kuhnt,** instruisto, **Breslau-2,** Arbetiusstrasse 34 (Germanio), interŝ. belajn gvidlibrojn en esperanta, germana, angla kaj franca lingvoj, PI, il. gaz. kaj fotojn de belaj virinoj. Mi posedas gvidlibrojn de Köln, München, Dresden, Wien, Silezio, Nigra arbaro ktp. Ne sendu bagatelojn!

El ĉiuj landoj

ni bezonas nun validajn tekstojn de leĝoj pri ekleziaj eksiĝoj.

Kiu helpos

kompili tiujn ĉi leĝojn kun dekretitaj komentarioj pri plenumado? Kopioj de originalaj tekstoj kun aldono de esperantlingva traduko estas necesaj. Sciigu ankaŭ al ni, kie tiaj leĝoj ne ekzistas kaj kie la eksiĝo ne estas ebla kaj kial. — Eventualajn elspezojn ni repagos. SAT-anoj, per tiu ĉi laboro vi servos al la liberiga movado proletara! Ĉiu aktivulo sin sentu devigata kunlabori kaj skribu al:

Hermann Platiel, Landshut i. B. (Germanio), **Klötzlmüllerstr. 14/2.**

ENHAVO:

Kapitalismo kaj Sindikatismo en Egiptio . . . . pĝ. 123
Ses jaroj de Internacia Laborista Helpo . . . . „ 124
Faktoj kaj komentoj . . . . . „ 125
El Polio . . . . „ 125
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo . . . . „ 125—126
La faŝista teroro de Horthy-Hungario daŭras . . . . . . „ 126
Tago el mia vivo . . . . „ 127
Impresoj pri Sovetio . . . . . „ 127
Germanio super ĉio, super ĉio en la mond'! . . . . „ 127
Sennaciula Studenta Paĝo . . . . „ 128
Tra Esperantio . . . . „ 129
Korespondado, Anoncoj . . . . „ 130

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)